

	<p>Kongreso de Tutmondaj Verduloj</p> <p>Incheon, Korea 2023</p>	 verduloj.org
---	--	---

Kontinentaj Federacioj de la Tutmondaj Verdaj Partioj



Preamblo: La estonteco de vivo kaj justeco estas grave kompromitita dum la klimata krizo kaj malegaleco senĉese progresas. La homaro estas ĉe vojkruciĝo.

Ni, la Tutmondaj Verduloj, renkontiĝante en Koreio, ripetas nian plenan engaĝiĝon labori kune por konstrui sekuran vojon al la estonteco. Estonteco kie ĉiuj formoj de vivo estas respektataj, kie ĉiu rajtas esti kiu li/ŝi volas esti kaj vivi la vivon kiun ĉiu homo meritas, en ekvilibro kun naturo.

La Tutmondaj Verduloj konsistas el kvar sendependaj federacioj de Verdulaj politikaj partioj kaj movadoj establitaj regione en Afriko, Amerikoj, Azio-Pacifiko kaj Eŭropo. Nian tutmondan organizaĵon unuigas la ekologiaj, klimataj kaj socia-justecaj motivoj & kaŭzoj, kaj ni subtenas ke unueco en diverseco estas nia unika ŝanco defendi partoprenan demokration kaj alportas la ŝanĝojn necesajn por trakti la plurflankajn krizojn kiuj alfrontas la homaron. Ni ne rajtas prokrasti, sed devas agi forte kaj rapide.

La KOVIM-19-pandemio malkaŝis la profundajn malegalecojn en nia mondo, kaj pruvis kiom rapide ŝanĝo povas okazi kiam politika volo estas aktivigita.

Demokratio estas atakata en ĉiu regiono de la mondo. Tutmonde demokratio estas en malkresko ekde 2006, rezultigante ke unu kvarono de la monda loĝantaro vivas en fermita aŭtokratio kaj plie preskaŭ duono vivas en balota aŭtokratio. Malobservoj de homaj rajtoj, gendra kaj seksa diskriminacio pliiĝas, rezultigante la pliiĝon de subpremaj leĝoj, decidoj kaj evoluoj, kaj samtempaj minacoj al indiĝena, kultura kaj etna diverseco.

Pli da konfliktoj tra la mondo kreas rekordajn nombrojn da rifuĝintoj kaj delokitoj. Klimata ŝanĝo kaj perdo de biodiverseco rapide akceliĝas, dum tutmonde, la ritmo de nacia kaj internacia klimata agado ne sukcesas regi tiujn polikrizojn.

Tial, ni la Tutmondaj Verduloj, staras unuigitaj en nia engaĝiĝo strebi al daŭrigebla kaj justa mondo. Per komuna vizio kaj celo, ni pledas por urĝaj agoj pri la klimata krizo, konservado de biodiverseco, socia justeco, paco kaj demokratio. Kolektive ni postulas ĉiujn rajtojn por

certigi, ke junuloj kaj estontaj generacioj heredos la plej bonan, kiun ni povas heredigi al ili. Ĉi tio estas nia respondeco. Tutmondaj Verduloj unuiĝas pri:

Klimata krizo.

✓ Rekonante la mallongan tempospacon por ŝanĝo, kaj la ekzistecan minacon kiun prezentas la klimata krizo, ni emfazas la bezonon de tuja kaj ambicia agado por mildigi ĝies efikojn kaj adaptiĝas al ŝanĝiĝantaj kondiĉoj.

✓ Subtenante la urĝan transiron al malalt-karbona, cirkla kaj rezistema ekonomio, antaŭenigante konsum-manieron kiu postulas malpli da energio kaj resursojn, renovigeblan energion, energi-efikecon kaj daŭrigeblajn praktikojn por redukti forcej-efikaj gasoj, kaj justan transiron.

✓ Rekonante, ke tiuj kiuj estas malplej respondecaj pri la klimataj krizoj portas la plej grandajn efikojn, kaj ke tio pliigos konfliktojn kaj krome delokitojn kaj rifuĝintojn.

✓ Alvokante al internacia kunlaboro kaj kunlaboro por efektiviĝi efikajn klimatajn politikojn, certigante ke ĉiuj nacioj kontribuu sian justan parton por kontraŭbatali klimatan ŝanĝon kun komunaj sed diversaj respondecoj.

✓ Pledante por la protekto kaj konservado de ekosistemoj kaj naturresursoj kiel esencaj iloj en klimataj mildigaj kaj adaptaj strategioj.

Biodiverseco

Rekonante ke naturo kaj biologia diverseco estas la fundamentoj de nia mondo, kaj ke ni esence dependas de ili por la vivantaĵo, vivtenado, sano kaj hejmoj, kaj ke la klimataj krizoj kaj biodiversecaj krizoj estas neforigeble interligitaj.

Alvokante por la laŭleĝa rekono de ekocido kaj la laŭleĝaj rajtoj de naturo, kaj efikaj kadroj reguligi kaj protekti naturon kaj biodiversecon, kaj ke ĉi-tiuj leĝoj provizas efikan politikan okazon por rapide subteni klimataj kaj ekologiaj celoj.

✓ Rekomendante por la adopto de daŭrigeblaj agrikulturaj praktikoj, antaŭenigante biodiversece afablaj agrikulturo-metodoj kiuj konservas la sanon de la grundo, protektas polenigantojn, kaj reduktas la uzon de danĝeraj kemiaĵoj.

✓ Alvokante por la establo kaj efika administrado de protektitaj terenoj, kaj surtere kaj en la oceanoj, por sekurigi biodiversecon kaj konservi fragilajn ekosistemojn.

✓ Subtenante iniciatojn kiuj antaŭenigas la justan dividon de utiloj derivitaj de genetikaj resursoj, respektante la rajtojn kaj sciojn de indiĝenaj gentoj kaj lokaj komunumoj.

Sociale justeco

✓ Konstatante ke sociale justeco estas neapartigebla de ekologia daŭrigebleco, kaj ke ni penas por mondo kie neniu estas postlasita.

✓ Rekomendante justan, samrajtigitan kaj daŭrigeblan aliron al resursoj, ŝancoj, kaj bazaj servoj, inter ili pura akvo, edukado, nutraĵo, sanzorgo, kaj loĝado.

✓ Starante kontraŭ ĉia diskriminacio, por antaŭenigo seksan (ĝendran) egalecon , LGBTQIA+rajtojn, junularon, kulturan kaj etnan diversecon, kaj inklusivecon en ĉiuj flankoj de la socio.

✓ Subtenante la povigon de marĝenigitaj komunumoj, interalie indiĝenaj gentoj kaj portantoj de tradicia scio, certigante ilian gravan partoprenon je decidofaradaj procedoj.

Paco kaj sekureco

✓ Kredante je inkluziva koncepto de homa sekureco surbaze de plurflankismo, internacia justeco, principo de la jurŝtato kaj la protekto de homaj rajtoj.

✓ Rekonante ke paco kaj sekureco estas antaŭkondiĉo por daŭripova evoluo kaj deca vivtenado por ĉiuj, ni subtenas neperfortan, feministan intersekcan alproksimiĝon por laŭeble solvi konfliktojn kaj la antaŭenigon de dialogo, kunlaboro kaj diplomatio.

✓ Emfazante la gravecon de ekologia pacofarado, rekonante la interligojn inter degenerado de la naturmedio, nesufiĉeco da resursoj kaj konflikto.

✓ Malakceptante la uzon de armeaj rimedoj ŝanĝi landlimojn aŭ rabi liberecon de la popolo.

✓ Denove konstatante la rajton je memdeterminado, la rajtojn de indiĝenaj gentoj, la teritorian integrecon de suverenaj ŝtatoj kaj la rajton je sindefendo.

✓ Ripetante nian subtenon por atoma senarmiĝo kaj nian klopodojn kampanji por mondo sen atomarmiloj.

✓ Kondamnante kiel eble plej forte ofendojn de homaj rajtoj, genocidon, krimojn kontraŭ humaneco kaj militkrimojn, kaj subteni internaciajn sendependajn esploro-klopodojn kiel pere de la ICC (Internacia Krim-Kortumo en Den Haag).

Demokratio

✓ Konfirmante la principojn de partoprena demokratio, travideblo kaj respondeco, rekomendas por inkluziva kaj respondema estrado surbaze de fundamentaj rajtoj kaj principo de la jurŝtato je ĉiuj niveloj, kiel la bazo por digna vivo en egaleco, certigante klimatan kaj socialan justecon por ĉiuj.

✓ Subtenante klopodojn por kontraŭbatali korupton, antaŭenigi liberan sinesprimon, certigi aliron al informoj, ebligi informitan publikan debaton kaj aliajn bazajn civitajn rajtojn.

✓ Devontiĝante sin batali por vigla civila socio inkluzive de serioza civitana engaĝiĝo, kaj defendante Neregistarajn Organizaĵojn, homajn rajtojn kaj ekologiistojn, indiĝenajn gentojn, sendependajn ĵurnalistojn, universitatanojn kaj sciencistojn.

Kiel unuigita internacia movado, ni Tutmondaj Verduloj estas kataliziloj por ŝanĝo. Pere de kolektiva agado, partnereco, forta vizio, kaj komuna sindevontiĝo al daŭrigebleco, pli bona mondo povas esti konstruita por estantaj kaj estontaj generacioj.

Ĉi tiu estas nia respondeco kaj nia kolektiva alvoko por tuja agado.

2023-07 Tradukita de AVE: ave@verduloj.org kaj Manfred@Westermayer.de